

STARTO



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO * N^o 4-5 * (62-63)

LENIN KAJ "PROLETARA LATINO"

La ekziato de S.I. Hillerson pruvita



La gazeto "Esperantista", organo de EACSР en Praha, enpresis en sia n-ro 9-10, j. 1948, p. 92 raporton pri intervjuo, kiun prof. Miloš Lukáš kune kun la rusa esperantisto Šimon Eliovič el Parkovo ricevis en Praha en la j. 1920 de d-ro Hillerson, la tiama estro de iu soveta misio en Praha, pri la temo "kiel la sovetoj traktas la esperantan movadon". En la intervjuo d-ro Hillerson deklaris sin amiko de V.I. Lenin, kiu plurfoje diskutis kun li pri la internacia lingvo. Laŭ Hillerson Vladimir Iljič persone ŝatas Esperanton, nomas ĝin "proletara latino" kaj

esperas, ke ĝi helpos per sia ideala facileco afike akceli la interkompreniĝon de la tutmonda laboristaro. La informo estis poste reprezentata kaj citata en pluraj eksterlandaj gazetoj.

Demandite de mi en j. 1956 kaj 1971, prof. Lukáš skribis deklaris, ke li bezonas nenion ŝanĝi en sia citita aserto, aldonante nur, ke li post tiom da tempo ne memoras la precizajn vortojn en la intervjuo, sed la raporto almenaŭ laŭsence estas nepre f i d e l a .

Prof. S.N. Podkaminer /Leningrado/ en sia traktato "Lenin kaj Esperanto" en "der esperantist", Berlino /GDR/, n-ro 42/1970, p. 2-22 diras sur p. 17, ke tiu ĉi indiko de Lukáš "sendube estas tre grava, sed, bedaŭrinde, ĝis nun estis neeble trovi iujn postsignojn de tiu Hillerson". Podkaminer informis min 20.4.1971, ke li, prof. Bokarev, moskvaj kaj ukrainaj esperantistoj serĉis por ion trovi pri Hillerson kaj Eliovič en registaraj arkivoj, sed dum senrezulte. Ankaŭ la Instituto Marx - Engels - Lenin en Moskvo respondis al ili negative.

Rimarkigo: Tiun ĉi informon publikigis detale La Pacaktivulo /Bulg./ kaj la Verda Kolombo /Jap./. Laŭ invito de CEA mi transdonas ĝin, kun la supra ĉefina kompletigo, al la legantoj de Starto en pli konciza formo.

Mi do mem decidigis provi dokumenti la ekziston de Hillerson aŭ Gillerson - laŭ rusa transskribo. En februaro 1976, mia klopodo trovis plenan sukceson.

La Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj - Ĉeĥoslovaka-soveta instituto en Praha, do institucio plej kompetenta, informis min letere, pere de la redakcio de la ĵurnalo Práce, ke d-ro Gillerson ekzistis, estis ĉefo de misio de la soveta Ruga Kruco. "Vico da sovetaĵ materialoj pruvas, ke li kunlaboris al V.I. Lenin en la tempo de lia politika elmigranteco." La Instituto sugestis, ke respondojn je miaj demandoj pri Gillerson mi serĉu en du prihistoriaj verkoj, eldonitaj en Praha en 1975: 1) Dokumenty a materiály k dějinám čs. - sovětských vztahů 1917-1922, 2) Přehled dějin čs.-sovětských vztahů 1917-1939. En tiuj verkoj Gillerson estas multfoje citata. PhDr. Jaromír Jermář, scienca laboranto en la Akademio kaj estrarano de CK ĈEA, post pristudo de la verkoj - laŭ mia peto - trovis, ke S.I. Gillerson estis en Praha de 10.7.1920 ĉefo de la soveta reenpatrujiga misio de la Ruga Kruco, peranta, same kiel anloga ĉs. misio en Moskvo, interŝanĝon de militkaptitoj. La misio laŭfakte estis la unua soveta reprezentantaro en ĈSR kun rajtoj de eksterteritoriesco.

El la materialoj cititaj de la Akademio-ĈSSI evidentiĝas du aŭ tri gravaj faktoj, de ni serĉataj: 1) D-ro S.I. Hillerson efektive vivis, 2) okazis kunlaboro inter li kaj Lenin, sed en tia grado, ke 3) d-ro H. reprezentis en Ĉeĥoslovakio en 1920-21 la junan Sovetan Union en sufiĉe grava ŝtata funkcio.

Jen estas unu flanko de la afero: mi dokumentis la ekziston de la persono kaj la specon de rilato de tiu persono al V.I. Lenin.

Alia flanko de la afero estas la aŭtenteco de la enhavo de la supre citita intervjuo: ĝi restas malfermita, ne dokumentita. Neniu inter ni ja dubas, ke Lukáš skribis kaj parolis veron. Kaj la samon oni certe povas atendi de pruvita kunlaboranto de V.I. Lenin kaj ŝtata reprezentanto de USSR. Sed mankas la oficiala skriba dokumento pri tio. Tiu cirkonstanco sendube malplivalorigas la enhavon de la atestaĵo. Por la serĉanto en la afero, prof. S.I. Podkaminer, la atestaĵo estas ĝis nun senvalora. Li konsilas ne uzi plu la pritraktitan eldiron. Ni daŭrigu la serĉadon, skribis al mi Podkaminer /marton 1976/. "sed ne forlogu nin per tre dezirataj, sed, bedaŭrinde, ĝis nun ne pruvitaj faktoj", individuaj rememoroj kaj aliaj argumentoj, per kiuj ni ne povas venki tiajn kontraŭulojn, sed nur plifortigi ilin".

La hilersona esprimo, laŭ Podkaminer, staras en kontraŭdiro, i.a. al eldiroj de M.I. Uljanova, fratino de Lenin. Ekzistas signoj, ke li ne interesiĝis pri IL, sed lian atenton alvokis ebleco uzi gnan movadon por revoluciaj celoj. Tial oni povas klarigi la subtenon de la soveta registaro al la E. - movado.

Laŭ opinio de Podkaminer, bazita sur du nove trovitaj faktoj, Lenin ne estus metinta sur breton de sia libroŝranko la trovitan lernolibron de E., ricevitan de franco Marat kun dedico "Al la patrono de E.", se li konsiderus Esperanton absurdajo, kaj la aŭtoro de E. - lernolibro, vortaroj kaj krestomatio, Saĥarov, ne povus post la revolucio eldoni la librojn sen paperkvoto, kiun asignis Lenin persone post interparolo kun Saĥarov. La eldonajoj aperis.

Fine - konsilas S. Podkaminer - la serĉado devas esti daŭrigata, "ĉar la rilato de Lenin al la E.-movado havas nepreterpasantan gravecon por tiu movado".

Mi fine aldonu, el alia flanko, ke esperdana kaj grava estas la senco de la verko "Problémy interlingvistiky", verkita en la lastaj jaroj de lingvosciencistoj el la Soveta Akademio de Sciencoj, kiuj post pristudo de centoj da projektoj de IL venas al la konkludo, ke Esperanto estas la sola planlingvo, kiu estas konvena por internacia komunikado.

Jar. Mařík

✧ Jubileaj konsideroj ✧

La nunjara jubileo de Esperanto estas denove okazo por reregardi al jardekoj forpasintaj kaj serĉi instruon pri la estonta evoluo de la Internacia lingvo.

Sendube jam la fakto, ke Esperanto sukcesis dum tiuj naŭdek jaroj renaskiĝi el cindro de la du mondmilitoj, rezisti al persekutoj kaj samtempe kapti interesigon de milionoj, elokvente provas pri ties vivkapablo kaj dinamiko. La sopiroj de la Esperanto-adeptoj estis ĉiam proksimaj al tiuj de la interpopola amikeco kaj paco kaj oni ne povas kontesti, ke ankaŭ la neutrala, universala kaj demokratia movado de Esperanto daŭre klopodis pri ilia efektivigo.

Malgraŭ diversaj apartenoj politikaj aŭ religiaj de siaj partianoj la esperantista movado sin prezentas hodiaŭ per sia monda organizaĵo antaŭ la internacia forumo kiel unueca forto sekvanta sian programon sur ĉiuj niveloj de sia agado.

La adaptoj de Esperanto, kiuj prenis sur sin la taskon akceptigi tiun ĉi lingvon por la tuthomaraĵ bezonoj, neniam povis esti indiferentaj al eksteraj eventoj, kiuj esence influis kaj influas ankaŭ la vivekzistadon de ilia interkomprenilo, konsiderante, ke nur tiel ili kapablos realigi ankaŭ la aspirojn de la interlingvo.

Tiu ĉi socia rolo de la esperantista movado ne povas esti rezult-hava sen komplota malfermiteco frunte al ĉiuj gravaj faktoroj kaj okazajoj de la internacia vivo, rilate al organizaĵoj, kies programo esprimas la komunajn celojn. Ĝi ne povas esti rolo de pasiva observado kaj glosanto kaj ĝi ne povas fidi ja pure taktikaj kaj efemeraj aktivecoj.

Kiel ĉiu socia movado, kiu celas dievastigon kaj larĝskalan aplikon, ankaŭ la esperantista serĉas siajn aliancinojn. Ĉar la problemoj de interkompreniĝo akre sentas ĉiuj, kvankam ne ĉiuj povas aŭ deziras fariĝi anoj de la sama ideo, kion bedaŭrinde la esperantistaro ofte kutimas konsideri sia precipa misio. La ĉiutaga sperto montras, kiel sen- aŭ malmultefikaĵ estas tiuj ĉi manieroj atingi la vastan socian terenon. Ankaŭ laŭkvalita pligrandiĝo de la movado estas ĉefe konsekvenco de la koncisa agado bazita sur nia ampleksa socia rolo, sub kiu ni tute ne komprenas simplan "varbadon".

La opinio pri la mondo, kiu ignoras la "sanktan aferon" kaj ne tro emas kompreni ĝian gravecon estas do arkaika kaj provas nur la ne-scion pri la objektivaj leĝoj flanke de la opiniantoj. Kontraŭe, profitado el tiuj ĉi leĝoj estas kondiĉo por antaŭenigi la aferon. Senpacienco pri la "nekontentiga" stato de la afero spegulas la du fenomenojn enradikiĝintajn en la movado, nome radikalismoj kaj pseudoavangardismon. La "radikalistoj" ekzemple ŝatus, ke oni tuj enkonduku tutmonde Esperanton. La "avangardistoj" evidencigas laŭ nia opinio miskomprenon, ke la movado povus okupi tian lokon sen avangardo socia.

Dum la lastaj jardekoj konsiderinde ŝanĝiĝis la lingva situacio, kion favoris profundaj demokratiaj kaj revoluciaj ŝanĝoj en mondaj kadroj. Ĉesis epoko de ekskluziva superregado de la plej uzataj mondlingvoj, la angla kaj franca, kvankam la diverslingveco ankoraŭ pli ŝarĝas la homaron per enormaj mensaj kaj materiaj perdoj, ĉar la novaj lingvoj ekokupis sian lokon en internaciaj kaj interŝtataj rilatoj.

Kiel konate, la iamaj koloniaj potencoj esperis sisteme disvastiĝi siajn lingvojn ankaŭ sub la ŝildo de simpligiĝantaj kompreniloj. Se la aŭtoroj de iuj naturalismaj projektoj agante laŭ tiu ĉi spirito konstruis ilin sur la premiso, ke la scienco kaj kulturo estas ligitaj ĉefe al la franca, angla kaj germana, hodiaŭ iliaj projektoj staras en vakuo. La lingva mapo, la praktiko montras tendencojn al lingva egal-

rajteco. Kaj tio estas esperiga ankaŭ por la ideo de unu komuna kaj vere internacia lingvo, kiu pli kaj pli fariĝas idanta kun la dievastigo kaj akcepto de Esperanto.

La lastaj jaroj atestas, ke la ideoj de la esperantismo estas ekstreme proksimaj al ĉeftendenco de la kuranta internacia evoluo. Tiun ĉi evoluon konfirmis la konata helsinki dokumento, sur kies fundamento la eŭropaj ŝtatoj esprimis la deziron pace kunlabori. Ankaŭ la esperantistaj organizaĵoj povus kaj devus akcepti ĝin kiel defion-malpli per aklamoj aŭ polemikoj, pli per pozitiva partopreno.

Oldřich Knichal

✻ *Omagaĵo al jubileo SET Lančov* ✻

La 18an de julio estis solene inaŭgurita la jubileo 25-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Ĉeestis sekretario de ĈEA Z. Křimský, reprezentantoj de Svazarm, Nacia Fronto kaj de Distrikta Paĉkonej-lantaro, kiu aŭspiciis la nunjaran aranĝon.

Omagaĵo al la jubileo Z. Křimský kaj la prezidanto de la aranĝanta klubo en Třebíč J. Jičínský enmanigis honorajn diplomojn al meriti-taj funkciuloj kaj tendaranoj. La estraro de SET estis honorigita per diplomo de Svazarm kaj gratul-letero de Nacia Fronto en Třebíč.

Prof. Th. Kilian en sia solena alparolo akcentis, ke SET estis fondita de junaj homoj, el kiuj P. Sittauer ankoraŭ nun staras frunte ĉi tie kiel ekonomia estro de SET. En la tempo, kiam la internacia lingvo estis oficiale pretervidata, fondo de la tendaro estis ku-raĝa ago, sukcesinta sole dank al lerta kaj sperta intervenado de F. Sedláček ĉe kompetentaj instancoj. La tendaro elkreskis el kelkaj brikoj ĝis la nuna impona entre-preno, kiun oni povas rajte kalku-li al la plej gravaj institucioj de nia landa movado.

Apenaŭ estas eble imagi grandeg-an, ofereman kaj entuziasman la-boron, kiu estas daŭre plenumata, por ke la tendaro estu senĉese plibeligata kaj la aranĝoj perfek-tigataj. La nuna SET konsistas el deko da belaj kabanetoj, el pluraj dekoj da tendoj, modernaj kuirejoj kaj lavejoj. Ĉio ĉi troviĝas en rava angulo de la naturo, inter potenca arbar-murego, sur vasta herbejo, izolita kaj tamen en naj-bareco de pluraj tendaroj aliaj. Ĝi estas siaspece unika en la meza

Eŭropo.

En 1977 al SET Lančov aliĝis por la unua stapo 130 partoprenan-toj, instruataj en 11 kursoj, por la dua stapo 160.

(pe-vo)



Sekretario Křimský enmanigas hono-rajn diplomojn en Lančov.

Sube fotografio el kunveno de gele-rnantoj de korespondaj kurzo en Po-děbrady en majo tiuĵijere.



✧ Saluto el Saharo ✧

En la komenco de tiu ĉi jaro alveturis grupo de ĉeĥoslovakaj geologoj en la ĉefurbon de Libio. Tripoli estas moderna, tipe araba urbo kun granda haveno, multaj moskeoj, mallarĝaj stratetoj kun vendejetoj en la centro kaj larĝaj avenuoj en novaj kvartaloj. La bordo de Mediteraneo verdas per multaj daktilpalmoj, oliv- kaj oranĝarboj. En la kontinento kontraŭe flauro estas bagatela.

El la bordo ni veturis per japanaj terenoveturiloj Toyota - Land Cruiser al sudo, en dezerton. Proksimume 1000 kilometroj sude de Mediteraneo estas en provinco Fezzan la valo - "Vadi Sati" - kun kelkaj oazoj. Ĉi tie, en la oazo Brak, ni havas bazon kaj el ĝi elveturadas ĉiam je kelkaj tagoj en la dezerton.

La tasko de nia ekspedicio estas entrepreni dum 8 monatoj geologian karton de ampleksa teritorio de la dezerto, krome ni esploras ankaŭ gravajn mineralojn. En la centro de la regiono estas montaro "Džebel Masauna aŭ Džebel Fezzan, kun altaj iamaj vulkanoj kaj sovaĝaj valoj, kie multloke ankoraŭ ne estis la homo. La tuta regiono situas ekster civilizacio kaj mankas tute akvofontoj. Ĉion inkluzive de akvo oni devas veturigi en aŭto.

En junio kaj julio kulminas "sahara somero". Temperaturo tie ĉi atingas 45 - 50 °C en la ombro.

Dum la esplorado ni faris gravan paleontologian malkovron - fosiliojn de fiŝoj, ranoj kaj mambestoj ("damanoj"), antaŭuloj de elefantoj. Laŭ proklamo de eminenta ĉeĥoslovaka paleontologo, profesoro RNDr Z. Špinar, DrSc, kiu partoprenis la esploron, temas pri la tre rara trovo de fosilioj aĝaj proksimume 50 milionoj da jaroj. Skeletoj de tiuj ĉi "damanoj" estas plej bone konservataj el ĉiuj, kiuj estis iam trovitaj.

Interesa estas ankaŭ trovo de rokaĵ desegnaĵoj de bestoj-girafoj, antilopoj kaj strutoj - en la valo "Wadi Deb Deb" ce la oazo Brak, kiuj vivis ĉi tie en la tempo, kiam Saharo estis stepo. Ili aĝas proksimume 3-5 mil. jarojn kaj analogaj kun tiuj en la montaro Tassili en Alĝerio kaj aliloke en la norda Afriko.

Aleš Nedomeš, prez. de EK Liberec,
membro de la ekspedicio

Medicinista Konferenco en Krakovo

MEDALO AL ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTO

La I-a internacia medicinista Esperanto-konferenco okazis inter la 13a kaj 17a de julio en Medicina Akademio de Jagelona Universitato, Krakovo. Aranĝis la renkontiĝon 100membra rondeto de studentoj.

La konferenco havis vere internacian nivelon. Partoprenis 57 medicinistoj el 9 ŝtatoj /du el Usono/. Ĉiutage antaŭtagmeze estis bonkvalitaj prelegoj diverstemaj: pri kuracmanieroj, medikamentoj, socialaj kondiĉoj de medicinistoj, asekuraj sistemoj, traktado de pacientoj kaj ilia konduto, disvastigo de E-o inter la medicinistoj. Komunaj ekskursoj al Vavel, Osvieĉim, Vielička firmigis la kontaktojn kaj faris la konferencen neforgesebla. La junaj polaj organizantoj trovis plenan subtenon, precipe financon, de la rektoro kaj zorgis ankaŭ pri la akompano de eksterlandaj gastoj.

Sola ĉeĥoslovaka partoprenanto d-ro J. Hradil prezentis du prelegojn (Homo kaj medio, Esperanto en medicino). Pro sia longjara redakta laboro kaj klopodo disvastigi la Internacian lingvon en medicinistaj rondoj li kun la aliaj ĉeestintoj transprenis de la rektoro de la medicina akademio prof. T. Popiela la jubilean medalon de Kopernik.

Z moskevského shromáždění křesťanů

Jsem rád, že mohu napsat o události, která je důležitým předělem a bude mít stále místo v dějinách vztahů mezi světovými náboženstvími. Ve dnech 6.-10. června 1977 se sešla, po dlouhé přípravě Světová všenáboženská konference za trvalý mír, odzbrojení a spravedlivé vztahy mezi národy. Konala se v Moskvě na pozvání Ruské pravoslavné církve a z iniciativy jejího patriarchy PIMENA.

Na 650 delegátů a účastníků ze 107 zemí všech světadílů pochopilo vážnost nebezpečí, jež ohrožuje samu budoucnost života na zemi, a jménem svých náboženství přijeli, aby se společně dali do boje proti zbrojení a válce. Svorně a bratrsky vedle sebe seděli buddhisté, křesťané, hinduisté, mohamedáni, židé, šintoisté, sikhové; nemluvili za své osoby, ale mnozí zastupovali vrcholné organizace. Světový mohamedánský kongres, Světová rada církví, Vatikán, Křesťanská mírová konference, Všeafriická konference církví, Světová luterská federace, Asijská buddhistická mírová konference, Konference evropských církví a další organizace byly zastoupeny delegáty nebo pozorovateli.

Hlavní přednášku k tématu konference "Za trvalý mír, odzbrojení a spravedlivé vztahy mezi národy" měl Mufti Zija'uddin Chan Ibn Išan BABA-CHAN, předseda Rady muslimů Střední Asie. Tři koreferáty měli gen. tajemník Všeafriické konference církví B. CARR, římskokatolický kanovník Raymond GOOR z Belgie a metropolita syrské pravoslavné církve z Jižní Indie Paulos MARC GREGORIUS.

Intenzivní práce probíhala v pracovních komisích. Ukázalo se, že je třeba odstranovat dost falešných předstáv a předsudků, ale vzájemná opravdovost obnovovala důvěru. Proto mohla všenáboženská konference přijmout za všeobecného souhlasu dva důležité dokumenty: Provolání k vládám zemí celého světa a Výzvu k náboženským pracovníkům a věřícím celého světa.

Zejména u Výzvy k věřícím cítíme, jak bylo obtížné formulovat společné prohlášení a jak vážně musili všichni brát nebezpečí hrozící lidstvu a že to bylo právě ohrožení základního práva člověka na život a to na život v míru, co spojilo všechny dohromady: "Naše náboženské přesvědčení nás nerozdělovalo, neboť jsme zjistili, že naše mravní cíle jsou podobné a v úsilí o dobro celého světa a lidstva jsme našli společný základ... Mezi námi vládl duch veliké srdečnosti a bratrství. Byli jsme spojeni snahou pracovat společně, spolupracovat s jinými lidmi dobré vůle, abychom na zemi vybuodovali svět bez zbraní, vytvořili společnost, v níž trvalý mír a spravedlivé vztahy vytvoří základ pro životní podmínky důstojné člověka".

Protože na všenáboženskou konferenci byly zastoupeny všechny světadíly, mohli delegáti mluvit z osobních znalostí o nebezpečných ohniscích, z nichž by se mohl rozhořet světový požár. Většina mluvila s uznáním o Evropě, která byla v minulosti zdrojem váleka a nyní dala příklad konferenci o bezpečnosti a spolupráci a závěrečným aktem. Tento příklad by měl pomoci i v jiných světadílech. Snižování napětí a mezinárodní spolupráce se musí rozšířit do všech oblastí - do politiky a ekonomie, vědy a techniky, zdravotnictví a výchovy, kultury i bádání. To není možné bez trvalého míru. Náboženství světa musí svými duchovními statky a svým mravním vlivem přispět k nastolení pokojného a spravedlivého společenství národů.

Proto byla na prvním místě jednání záležitostí všeobecného a úplného odzbrojení. Bez odzbrojení se proces snižování napětí nemůže stát světovým a nezvratitelným. "Zijeme ve světě, který sténá pod těžkým jhem zbrojení, konvenčního i atomového. Osud lidstva je stále v nebezpečí atomového vyhlazení... Uvítali jsme rozhodnutí svolat Světovou konferenci o odzbrojení a věnovat zvláštní zasedání Valného shromáždění

OSN pro přípravu této konference.

Výzva obrací pozornost k ohniskům válečného nebezpečí na Středním východě (Izrael, arabské státy, Palestinci), v Jižní Africe (apartheid a kolonialismus), v Asei (Jižní Korea), v Latinské Americe (neokolonialismus, fašismus).

Zvláště si všímá nadnárodních monopolů: "Svou mohutnou ekonomickou a technickou mocí zasahují nadnárodní společnosti bezrestně do záležitostí suverénních států ve všech světadílech, aby potlačovaly pokrokové, demokratické síly národního osvobození... Věřící lidé by měli burcovat svědomí lidstva... k vyvinutí nutného tlaku, aby se tyto neuvěřitelné společnosti musely veřejnosti odpovědět".

Výzva končí: "Zdravíme vás všechny s radostí a vřelostí. Krácejme spolu jako dědicové různých náboženství na cestě míru a svornosti, ve službách lidstva. Podajme si ruku se všemi lidmi dobré vůle, ať jsou věřící nebo nikoli, při společném úkolu budování míru a nastolení spravedlnosti v národech a mezi národy...".

✻ ✻ *Diversaĵoj* ✻ ✻

RENKONTIĜO EN OSTROV. La distrikta kulturcentro - Domo de kulturo en Ostrov kaj Esperanto-rondeto ĉa DK aranĝis inter la 26a kaj 28a de aŭgusto la 3an internacian renkontiĝon de esperantistoj en tiu ĉi urbo.

Ĝi okazis enkadre de signifaj jubileoj, nome omaĝe al 60a datreveno de Granda Oktobra Revolucio, al 90 jaroj de la Internacia Lingvo Esperanto, al 60 jaroj depost la forpaso de ties kreinto L. Zamenhof kaj okaze de 20jara ekzisto de ER en Ostrov.

La programo inkluzivis solenan koncerton, interkonan vesperon, peraŭtobusan ekskurson al banurbo Karlovy Vary k. a.

FILATELIA SUKCESO. S-ro D. Bartošík el Prago gajnis por sia kolekto "Historio kaj nuntempo de Esperanto" grandan oruman medalon okaze de Interstata ekspozicio de poŝtmarkoj de ĈSSR kaj Bulgario "TŘEBÍČ 1977", okazinta en la tagoj 4. - 12.6. La alian medalon, malgrandan orumitan, gajnis por sia kolekto "Capitroj el la historio de Esperanto" V. Vána el Plzeň, kiun li ekspoziciis en la Interstata ekspozicio de pm de ĈSSR kaj GFR "KLADNO 77" (9. - 14.4.).

GAZETARA SPEGULO. Sub la titolo "La lingva baro kaj kiel superi ĝin" aperis en la magazino de Malo sobota (printempo 77) unupaĝa traduko el gazeto Sovetskij sojuz, kiu intervjuis doktoron pri filologiaj sciencoj M. Isajev. Ĵurnalo Mladá Fronta 9.7. publikigis en sia sabata aldono la artikolon de O. Kníchal "Manon en Esperanto", kiu traktas la funkciadon de IL kiel pontolingvo kaj ĝian pozitivan kontribuon al la celoj de la tuteŭropa kultura kunlaboro. Surbaze de tiu ĉi artikolo aperis informojn en Práce kaj Lidová demokracie (3.8.). "Esperanto naudekjara" estas artikolo de S. Borovka en Ĵurnalo Svobodné Slovo (27.7.)

UPOZORNĚNÍ: V posledním čísle jsme nedopatřením uvedli, že esperantský text Všeobecné deklarace lidských práv lze obdržet v Informačním středisku OSN v Praze. Tato informace se nezakládá na pravdě; ústředí má k dispozici pouze texty deklarace v jiných jazycích, které vydala OSN.

STARTO - tiskový orgán ĈES. Řídí redakční rada: odp. redaktor Kníchal, zást. PhDr. Jermář CSC; členové: J. Čink, Z. Hrášel, J. Mařík, J. Vondroušek, ing. J. Werner, ing. Kočvara, Z. Krámský, J. Klement. Vychází 6x ročně. Tiskne rozmnožovna Počniku služeb Neratovice. Peranto por SSER: A. S. Melnikov, n. k. 393, Rostov-Don. Předáno do tisku 2.9.1977.

Sukcesa prezentiĝo en Varsovio kaj Bruselo

DELEGITOJ DE MEM EN VARSOVIO. Kiel ni jam informis la trimembra delegitaro de MEM partoprenis Mondan Asembleon de Packonstruantoj en Varsovio (8. - 11.5.1977). En la 4-a forumo de la Asembleo (pri kunlaboro inter neregistaraj organizaĵoj) la prezidanto de MEM N. Aleksiev koncize prezentis la celojn de tiu ĉi esperantista pacmovado kaj faris konkretan proponon al ĉeestintoj. Li diris i.a.:

"Por levi pli altan la prestiĝon de la koncernaj organizaĵoj, por fari el la monda publika opinio pli gravan kaj pli solidan faktoron en la pacbatalo, estus utile laŭ mi, se Monda Packonsilantaro farus aldonaĵojn por influo en UN, UNESCO kaj aliaj interŝtataj organizaĵoj por publikigo de la pozicioj kaj aktivecoj de neregistaraj organizaĵoj favore al la paco. Tio konatigos ties porpacaĵon, levos ĝian prestiĝon kaj helpos ankaŭ al la interŝtataj organizaĵoj aktivigi sian porpacaĵon".

La prezidanto de la forumo dankis al kdo Aleksiev kaj diris laŭdajn vortojn pri la agado de esperantistoj favore al la paco kaj pri la taŭgeco de la Internacia lingvo.

Kiel la nova membro de Monda Packonsilantaro estis apud N. Aleksiev elektita por MEM ties ĝenerala sekretario W. Gilbert, Francio.

Laŭ la informo de D. Kočvara, sekr. de MEM kaj membro de la delegitaro, ĉiuj traktadoj de la varsovia Asembleo estis tradukataj en ses lingvojn. Tamen okazis, ke la rapidan paroladon de la meksikia delegito la tradukistoj ne kapablis sekvi kaj dum la alparolo de la delegito el Turkio la aŭskultiloj silentiĝis. Tio evidentiĝas, kian avantaĝon alportus en la laboroj de la Asembleo scipovo kaj akcepto de la internacia lingvo.

KUNVENON DE LA INTERNACIA KOMITATO POR LA EŬROPA SEKURECO KAJ KUNLABORO en Bruselo fine de aprilo partoprenis ankaŭ la reprezentanto de MEM, peranto de la belga sekcio Clady Claude. Dum plenkunsido la 24an de aprilo li parolis antaŭ 60 reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. La prezidanto de la plenkunsido, kanoniko Goor substrekis la interesigon pri Esperanto, kiu servas por la interpopolaj kontaktoj kaj konstatis, ke per sia facila lingvo la esperantistoj informas pri gravaj aferoj.

LANŠKROUN - la 2-an de julio okazis en pitoreska pejzaĝo sur pinto de monteto Lázek apud Lanškroun renkontiĝo de gesamideanoj plejparte el proksimaj lokoj. Ĉirkaŭ 40 gesamideanoj el diversaj ER kiel Litomyšl, Česká Třebová, Žamberk, Svitavy, Herbotice kaj pliaj alilokoj partoprenis por manifestacii porpacaĵon batalon kaj ĝui samideanan amikan medion. Kun rakontado de unu el memorintoj ili honore rememoris la bravajn patriotojn, kiuj perdis siajn vivojn en batalo kontraŭ faŝistoj. Pri ilia heroeco atestas nun modestaj monumentetoj proksime de monteto Lázek. Poste sekvis amika interbabilado ĉe tendarfajro kun kantado kaj mangado de rostitaj kolbasetoj. Pri novaĵoj kaj aktualaĵoj el movado kaj centra komitato informis 8-an Rýznar kaj 8-anino Zedníčková. Rekontiĝon ĉeestis ankaŭ eksterlanda gasto el Francio kaj prenis ĝin negranda rondeto el Lanškroun.

/z/p/

Ĉe la lulilo de Esperanto en Ĉeĥoslovinkio

(Omaĝe al la 105-a naskiĝdatreveno de F. V. Lorenc, en la 90-a ekzistojaro de Esperanto. - Kun pluraj faktoj ĝis nun ne publikitaj.)



La domo n-ro 189/16. Antaŭ ĝi staras V. Lorenc kaj J. Mařík.
Foto: J. Šperling.

Běla Krapková-Raichlová, revoluciulino, kiu poste verkis, laŭ peto de Škába, la ĉehan tradukon, ĝis nun uzatan, de la ŝatata pola laborista kanto La Ruĝa Standardo.

En la unuaj jaroj de Esperanto oni ĉiam parolas pri la gastejo "U Pštrosů". Lau Josef Škába, deputito en la aŭstria parlamento, Omladina-ano, redaktoro de Nové proudy /Novaĵ fluoj/, Raichlová rakontis al li: "La rememoroj al tiuj pasintaj naudekaj jaroj estas pro mi ĉiam neforgeseblaj. La kunvenoj, ĉiam de la 7-a horo posttagmeza, kiam la laboristoj forlasadis la laborejojn, estis ĝojoplenaj, multnombre vizitataj. Oni diskutadis, prelegadis kaj kantadis tie ĝisnokte. Estis ĉiam mi, kiu gvidis la tumulton kiel kapelestrino, dum la studentoj Hajn, Klofáč, Škába, Soukup, k.a. faris la prelegojn, postulatajn de la junularo. Plenanime mi amis tiun ĉi idealan junularon. Arde sonis niaj kantoj..." (1)

Lorenc estis karakteriza, siatipa figuro de la socialdemokratia movado en la aŭstria regno, sub kies kruda hegemonio troviĝis la ĉeĥaj landoj (1620-1918). Li arigis ĉirkaŭ si grupon da junaj socialistoj kaj

eldonis politikan gazeton "Omladina". (2)

El la 1700-paga verko de d-ro Fr.Soukup "Revoluce práce" (revolucio de l' laboro), el kiu tamen saviĝis sole kelkaj ekzempleroj dum ilia enpreseja detruo, en 1939, fare de germanaj nazioj, ni denove sciigās ke Esperanto dum la 90-aj jaroj de la 19-a jarcento estis en proksimaj rilatoj al la menciita Omladina. Cetere, tion ni povas konstati ankaŭ en la adresaroj de Zamenhof. (1)

"Omladina" (junularo), estis politika movado de studenta kaj laborista junularo en Praha, laŭ la aŭstria monarĥia polico fikcie sekreta kaj landperfidaj societo, kion la polico uzis kiel pretekston por proceso (1894) kontraŭ Omladina kun la celo distreti la timatan progreseman movadon inter la ĉeĥa junularo. Inter la 68 kondamnitaj estis i.a. Stan. Kostka-Neumann - la poste fama proleta poeto kaj kunfondinto de Esperantista Klubo en Praha (1902). (Lian datrevenon en 1975 rememoris eĉ UNESCO).

Lorenc sentis, ke ne sufiĉas nur kurs-instrui. Li do verkis lernolibron de Esperanto - la unuan en nia lando (1890). Sed estante inter la Omladina-persekutatoj, Lorenc elmigris en sept. 1893 - antaŭ tiu proceso - Brazilon, kie li poste famigis en la portugala-kaj esperantlingva literaturoj. Dum ni en nia lando denove suferis sub la boto de okupaciantoj, nunvice la naziaj, la esperantistoj en la brazila urbo Santos honoris en 1940 la 50-jaran jubileon de la Lorenz-lernolibro por ĉeĥoj per alprenado de la nomo Esperantista Grupo "Francisco Valdomiro Lorenz" por la tiurba grupo. Tiel aspektis lia portugalgigita nomo. "Esperanto" (UEA, n-ro 623/1957, p. 160) nomis lin "la plej malnova ankoraŭ vivanta esperantisto en la mondo. Li posedis ĉ. 80 lingvojn". Lorenc mortis 24.5.1957.

La ĉeĥaj esperantistoj povas fieri, ke ĉe la lulilo de ilia organizita movado staras tri elstaraj membroj de la radikala socialisma movado: F.V.Lorenc, Josef Hybeš, gvidanto de la social-demokratia movado en Moravio kaj efektiva kreinto de revolucia programo de la aŭstria proletaro (1889) kaj S.K. Neumann. La estigo de la E.-movado en nia lando ne estis hazarda kaj ne estis hazarda ankaŭ la progresemaj karakteroj de ĝiaj fondintoj. (2)

Se vi foje iros tra la strato Pštrossova, haltu antaŭ la domo 189/16 kaj atencigu pri la preskaŭ forgesita esperantista "pratempo". Mi haltis tie la 17an de julio, kiam mi, post enarĥiva esplorseĉado, venis por fine identigi la precizan lokon de la "lulilo de Esperanto en nia lando".

Jaroslav Mařík

-
- (1) Leterformaj prihistoriaj rakontadoj (15.7.1961; 17.8.1961) de František Hájek (nask. ĉ. 1882, mort. 1972) al EK en Praha
 - (2) Parolado de PhDr Jar. Jermář, CSc, okaze de 75 jaroj de EK Praha (5.3.1977).

(Postnoto: restas nur bedaŭri, ke ne estas troveblaj la ceteraj materialoj pri la historio de la esperantista pratempo inter ĉeĥoj, kiun F.Hájek transdonadis en la 50aj jaroj, kun atentigo "gravaĵoj por la historio", al la Esp. Klubo en Praha)

Ba naopak, polovina léta byla pro ně nejrušnější obdobi z celé poloviny roku. V této době se Bor a okolí stalo na čas místem zvýšeného turistického ruchu, a okolo 400 turistů bylo po dvě noci hosty městečka, kterým vedla jedna z 15 tras celostátního setkání turistů v Domažlicích.

Pro mnohé občany naší republiky bylo Tachovsko dosud takřka "bílým místem" na mapě. Z tohoto omylu jsme se je snažili vyvést a ukázat jim, kolik historických cenností i krajinářských zvláštností má tento kout Českého lesa. Promítli jsme turistům barevné diapozitivy a doplnili je zajímavým vyprávěním. Tato akce byla tak podnětná, že další etapu procházeli turisté s velkým zájmem. Také hezkou trasu jsme pro ně vybrali a vyznačili my, esperantisté. Vřak také její malebnost a dokonalost značení byla vedoucím celého setkání s. Moserem kvitována s velkou chválou. V tu chvíli jsme rádi zapomněli, kolik hodin sobotního a nedělního volna v posledním půlroce jsme na to věnovali.

Naše akce byla velmi příznivě přijata Agitačním střediskem v Boru i představiteli MěNV, kteří nás požádali, abychom se stali pravidelnými dopisovateli nově zakládaného časopisu - "Zpravodaj města Boru". Současně budeme pravidelně přispívat do pondělního vysílání městského rozhlasu. Soubor relací pod heslem "Každý občan nechť dobře pozná místo, ve kterém žije", bude zakončen promítáním barevných diapozitivů nejdříve pro představitele Národní fronty, později pro borské publikum. Tuto akci, ve spolupráci a za technické podpory agitačního střediska, věnujeme 60.výročí Velké říjnové socialistické revoluce a tím se jako všechny ostatní složky Národní fronty připojíme k jubilejním oslavám této historické události.

Ni legis ...

Mia ankastelo

Kastelon mi konstruis iam
en reva valo inter arboj,
kaj mian amon fantazian
ĉirkaŭis per turetogarboj,

kaj mi starigis la ĵaluzon
provosi antaŭ la karcero,
obetine doni nur rifuzon
al ĉiu peto pri libero...

Sed iel am' eskapis fuĝe
el miaj envolvantaj turoj:
hedero nun rampadas ruĝe
sur disfalintaj kastelmuroj

Tiu ĉi poemo de W. Auld estas elektita el la KVAROPO, kies dua eldono aperis ofsetprese ĉe Hungara Esperanto-Asocio, 1977, kun postparolo de V. Benczik. La aliaj

"kvaropanoj" estas J.S.Dinwoodie, J. Francis kaj R. Rossati, kutime malguate nomataj kiel anoj de la tn. "skota skolo" de la Esperanto poezio.

"La ĝisnuna Esperanta kritiko havis du ĉeftendencojn: detalan, zorgan elsarkadon de la lingvaj pekoj kaj pardoneman indulgon, se temis pri la literatura valoro", skribis enkonduke al sia libro DE PAĜO AL PAĜO L. Tárkony en la jaro 1932. Intertempe pasis jam preskaŭ duonjarcento. Ĉu oni povas do rekonfirmi la supran aserton de la aŭtoro, kies pionira, kvankam naopinie senefa kontribuo al la literatura kritiko de Esperanto, meritis pli grandan atenton? La leganto juĝu mem studente antaŭmilitajn eseojn de Tárkony antaŭnelonge reeldonitaj ankaŭ dank' al HEA.

/k/

SOCIALISMO KAJ INTERNACIA LINGVO

(el artikolo de S. Podkaminer en Der Esperantist)

La reala bezono de internacia lingvo aperis unuafoje en la kapitalisma socio. Ĝin postulis la gigante kreskintaj interŝtataj kaj interpopolaj ligoj, internacia komerco, diverskarakteraj internaciaj kontaktoj kaj renkontiĝoj sciencaj, politikaj, fakaj, sportistaj k.a. La grandekale evoluinta trafikaj tekniko krea internacian turismon, kiun partoprenas nun ĉiujare centmilionoj da homoj, proprasparte konvinkigantaj pri baroj de multlingveco. Radio kaj televido estas ankaŭ forte bremsataj en ilia tutmonda disvastigo pro la multlingvesco.

Ni povas konstati, ke la kapitalismo kreis du al tri kondiĉoj por apero kaj, certagrade, progreso de internacia lingvo. Tion atestas la relative granda antaŭenmarŝo, en la fino de la XIX-a jarcento, de Volapuko, kiun baldaŭ superis kaj anstataŭis Esperanto. La venko de Esperanto estis kaŭzita de la fakto, ke ĝi estis nekompareble pli perfekta rilate kontentigon de la bezono, jam klare difiniĝinta, pri internacia komprenigilo por la diversnacia homaro.

La genia verko de Zamenhof ne nur donis eblecon de senperaj, diversecaj homrilatoj en ĉiuj kvin kontinentoj, sed montris sin ideale taŭga por verkado de politika, scienca, teknika, arta literaturo, traduka kaj originala.

Dum sia pli ol 80-jara ekzistado la Esperanto-movado atingis atentindajn sukcesojn, eltenis du mondmilitojn, frakasintajn diversajn ligojn, renaskiĝis post malfavoraj por ĝi sociaj eventoj en kelkaj landoj. La agnosko de Esperanto fare de Unesko, ĉiujaraj universalaj Esperanto-kongresoj, la relative granda kaj kreskanta Esperanto-literaturo, kapabla kvante konkuri kun literaturoj de multaj malgrandaj nacioj, regulaj disaŭdiĝoj, farataj de pli ol dek radiostacioj ktp., estas sendubaj signoj de la vivkapablo de la Esperanto-movado. Kaj tamen!

La nombro da esperantistoj en la tutmondo estas tute malsignifika: laŭ plej optimismaj pritaksadoj ĝi ne superas 0.15 % de la homaro, neniu kapitalista ŝtato subtenas finance kaj materiale la Esperanto-movadon, kiu tute dependas de privataj monrimedfontoj, kiuj plej ofte estas tre limigitaj kaj nesufiĉaj por la vasta organiza, eldona kaj informa agado. La regantaj klasoj de la kapitalistaj ŝtatoj ne havas la amon meti sian monon en la Esperanto-movadon, ĉar ĝi ne estas profitpromesa. Por ke ĝi estu profitdona, necesas ĝia amasigo; sed por ke la movado estu amasa, necesas... mono. Jen cirklo enoŝercita!

La plej granda kaj bone organizita internacia Esperanto asocio UEA, dum multaj jaroj klopodas pligrandigi sian membraron, sed malgrau la penoj, ne sukcesis atingi la modestan kvanton de 50 mil anoj. Ĝi suferas pro konstantaj financaj malfacilaĵoj kaj estas devigata limigadi, sian eldonagadon kaj organizan laboron pro la manko de monrimedoj. Tiuj ĉi malfacilaĵoj precipe kreskis dum la postmilitaj jaroj, karakterizitaj en la kapitalista mondo per inflacioj, depresioj, senlaboreco, prezaltigoj kaj valutfinancaj krizoj. Multaj esperantistaj organizaĵoj en la kapitalistaj landoj ne povas havigi al si la monon, eĉ por luado de la kunvenejoj, jam ne parolante pri eldona kaj vasta organiza laboro.

Sed la ekonomia kaŭzo, klariganta la malfacilaĵojn por la Esperanto-movado en la kapitalistaj landoj, estas nur unu flanko de la afero. Ekzistas la dua, ne malpli grava. La Esperanto-movado ne estas nur lingva, sed ankaŭ esence ideo. Ĝi estas plej firme ligita kun la ideoj de paco kaj amikeco interpopola. Ĉu povas definitive venki ti-

uj ĉi ideoj en la kapitalisma socio, kies regantaj klasoj timas kaj kontraŭbatalas ilin, kiel "komunistecajn", timigante ĉiuspecajn filistojn kaj malklerulojn?

Ju pli firmiĝas la paco sur la Tero, ju pli antaŭenmarsiĝas la maltenso de la internacia atmosfero, ju pli venkas la tendenco de paca kunekzistado de la ŝtatoj kun diversaj soci-ekonomiaj kondiĉoj, des pli kreskas la neceso kaj la ebloj aplikadi internacian lingvon. Kaj inverse, la disvastigo de Esperanto helpas plifortigi pacajn strebojn de la popoloj, ĉar la efektivigo de amasaj kontaktoj inter diverslingvaj homoj kreas amikecojn, reciprokan interkomprenon, deziron vivi paco kaj bari vojon al militoj.

La kapitalisma sistemo, en ĝia imperialisma stadio, karakterizata per akraj kaj pliakriĝantaj antagonismaj kontraŭdiroj, interstata kaj intermonopola konkurenco, agresemo, celanta redividi merkantojn, kruaĵfontojn per helpo de armiloj, de korupcio, politikaj mortigoj, samanta rasismon, faŝismon, perforte altruanda al popoloj vivmanieron, kulturon, lingvojn de la fortaj ŝtatoj ne povas efektiviĝi la definitivita venkon de la internacia lingvo.

Nia analizo konkludas nin al la konkludo, ke en la kapitalisma socio forestas la objektivaj kondiĉoj por la definitiva venko de la internacia lingva ideo. La Esperanto-movado en tiu ĉi socio estis, estas kaj estos stagnanta aŭ malrapidege progresanta, kio ne ekakluzivas izolajn, apartajn sukcesojn naci- aŭ internaciskale. Sed eĉ tiu grava atingo, kiel la pozitiva rezolucio de Unesko en 1954 rilate Esperanton ne donis iujn praktikajn posteekvojn por la plua disvastigo de Esperanto kaj eĉ ne helpis la provon starigi la problemon ĉe UN.

Nur en la socialisma socio estas kreataj ĉiuj objektivaj kondiĉoj por la venko de la internacilingva ideo.

La bezono de internaciaj ligoj atingas altan nivelon en la sfero de politiko, scienco, tekniko, arto, sporto kaj aliaj sferoj. Precipe gravan rolon ĉirilate ludas la socialista kulturo kaj la rapida kresko de la kultur-nivelo kaj kultur-bezonoj de la plej vastaj popoloamasoj. La sistemo de klerigado - senpaga kaj eĉ subvenciata, donas al ĉiu civitano de socialista ŝtato la eblon atingi la deziratan de li gradon de kultura kaj faka konoj, samtempe kreskigante ĉe li la aspiron konatiĝi kun aliaj landoj kaj popoloj. La neceso ekposedi internacian komprenigilon fariĝas pli kaj pli akre sentata.

Plej kare tiun ĉi neceson esprimis la fama rusa verkisto Maksim Gorkij, konvinkita adepto de Esperanto:
"Por la triumfo de kulturo ni kreas revolucion, elspezas ĉiujn fortojn de nia racio, nia volo, oferas nian personan liberon, vivon. Ĉu povas oni nei, ke lingvo unu por ĉiuj donos potencon impeton al la procesode la kultura evoluo? Oni ne povas! Sekve, oni devas agnoski necesa kreon kaj la evoluon de tiu ĉi lingvo. (1)

La socialismo senmalhelpe kaj vaste evoluigas ĉiujn produktivajn fortojn, speciale la sciencan kaj teknikan, inkluzive tiun de transporto kaj komunikoj. Liberigita de la ĉenoj de privata posedo, la tekniko povas plej larĝe servi al la kontentigo de materiaj kaj kulturaj bezonoj de la tuta popolo. Pli perfekta kaj malplikosta transporto al tiros milionojn da socialistlandanoj al internacia turismo, postulanta pli kaj pli la aplikon de la internacia lingvo. Ĝi estos ekstreme grava por la rapide evoluantaj radio kaj televido, kiuj dank al la internacia lingvo fariĝas vere internaciaj komunikiloj, ne plu bremsataj de la multlingveco.

Ne estas mirinde, ke komencante de la 19-a jarcento kaj ĝis nun homoj, kiuj partoprenadis persocialisman lukton ofte esprimis la komprenon de la neceso kaj graveco de internacia lingvo por la socialis-

mo.

Dum la Internacia laborista konferenco en Londono 1871 Karolo Marks diris, ke internacia unuigo de profesiaj sindikatoj estas malhelpata de lingvodiverseco. (2)

La problemon pri internacia lingvo pridiskutis la 2-a kongreso de la 1-a Internacio, okazinta en Svisio en 1867. Estie akceptita rezolucio, defendinta la ideon de internacia lingvo:

"La kongreso konsideras, ke universala lingvo...estas komuna bono kaj tre helpus unuigon de popoloj kaj fratecon de nacioj. (3)

La 2-a kaj la 3-a Kongresoj de Komunista Internacio (1920 k. 1921) havis en siaj tagordoj punktojn pri Esperanto kaj pri lingvo internacia (reep.). (4)

Estas ankaŭ ne mirinde, ke tri grandaj verkistoj-socialistoj: Maksim Gorkij, Romain Rolland kaj Henri Barbusse multfoje esprimis senkondiĉan subtenon al Esperanto.

En ĉiuj socialistaj landoj la esperantistoj ricevas malavaran subtenon de la registaroj: ili uzas senpagajn, komfortajn ejojn por kunvenoj, la ŝtatoj prenas je sin ĉiujn elspesojn por eldonado de lerna, beletra, politika literaturo en Esperanto. La plej multnombraj universalaĵ Esperanto-kongresoj okazas en la socialistaj landoj.

Tamen aperas motivita demando: se la socialisma socio kreas ĉiujn objektivajn kondiĉojn por definitiva venko de la internacilingva ideo, kial do en neniu socialista lando Esperanto ĝis nun estas oficialigita kiel ŝtata lingvo en la eksteraj rilatoj? Kial ĉ tiuj socialistaj ŝtatoj, kiuj plej forte subtenas Esperanto-movadon (Bulgerio, Hungario, Pollando) ne enkondukis Esperanton en siaj lernejoj, kiel devigan lernobjekton?

Oni ne devas forgesi, ke la problemo de la larĝekala apliko de Esperanto en ĉiuj vivosferoj tutmonde estas ne solvebla nur de kelkaj ŝtatoj, sed devas ricevi la aprobon kaj subtenon flanke de la plimulto aŭ almenaŭ de relative granda kvanto da ŝtatoj.

Ĝis tiu ĉi evento venos daŭros la prepara periodo, dum kiu apartaj socialistaj registaroj subtenados la Esperanto-movadon, depende de la aktiveco de la esperantistoj, pruvantaj kapablon de Esperanto bone servi al la efektivigo de la ideoj de paco, libero, sendependeco, kaj al la aliaj ideoj, konsistigantaj la kernon de la eksteraj politikoj de la socialistaj ŝtatoj.

La moderna internacia situacio, karakterizate per malfacila de la internacia atmosfero, malpligrandigo de la militminaco, progreso de la ideo de paca konekzistado de ŝtatoj kun diversaj soci-ekonomiaj sistemoj, kreas favorajn kondiĉojn por la sukcesa agado de esperantistoj, malgraŭ la streboj de la reakciularo revenigi la homaron al la "malvarma milito".

Antaŭ ĉiuj progresemaj Esperanto-organizadoj kaj esperantistoj la nuna momento starigas jenajn ĉefajn taskojn: ĉiumaniere helpi la realigon de la decidoj de Helsinko-konferenco pri sekureco kaj kunlaboro, kolektadon de subskriboj sub la Stokholma Alvoko pri malgrandigo de la vetermado kaj malmaligo kaj efektivigo de la Deklaro pri kunlaboro inter la Tutmonda Pacmovado kaj Mondpaca Esperantista Movado.

1) "Esperantista Movado" N 1-2, 1921 2) Marx/Engels: Verkoj, vol. 17, p. 644 (rusa eldono) 3) Procès verbaux du congrès de l' Association International des Travailleurs réuni à Lausanne de 2 au 8 septembre 1867, p. 52 4) 10 jaroj de Kominterno en decidoj kaj ciferoj, ŝtata eldonejo Moskvo - Leningrad, p. 33, 34, 52 kaj 58

L. Prachař: Esperanto pro děti od 8 let

Informovaný čtenář bude souhlasit s názorem, že učebnice esperanta, která u nás v Československu až dosud vyšly, jsou vešmě dobré. Jiná otázka je, zda jsou dostatečně moderní, protože i zde bychom měli držet krok s dobou.

Nedávno se mi totiž dostal do rukou titul "Esperanto pro děti od osmi let, učebnice určená žákům 3. tříd základních škol, kterou zpracoval L. Prachař pro potřebu školy v Pacově; učebnice, kterou já sama pokládám za úplně novou v této oblasti a zároveň za velice zdařilé dílo, prostě učebnici, jakou jsme již dávno potřebovali. (Mimochodem jméno autora se dovídám z přiloženého dopisu, zato v rozmožném exempláři je postrádám.)

Jak jsem již naznačila, právě toho si zvlášt' cením, že autor nechal stranou obvyklé názory a zpracoval věc zcela nově, moderně, tak, jak mu radila jeho vlastní zkušenost pedagoga: postupujeme obzřetně, od výrazů dětem blízkým (adreso, citrono, telefono) přes spoje (bela floro, nova filmo) a věty (tio estas vagono) až k jednoduchým článkům, které žák překládá a vypravuje svými slovy.

Výčet opravdu rozmanitých úkolů od těch docela nenáročných k takovým, jako je např. tvoření vět na daná slova, by trval dlouho. Některé jsou podobné těm, které děti znají z hodin češtiny, kterou si takto pomocí esperanta náležitě ujasní. Je to např. psaní podle nápovědi, doplňování písmen či slabik, správné řazení pomíchaných dvojic slov a mnohé další.

Modernost metody L. Prachaře vidím i v tom, že vede žáky k práci s knihou: vybarvování vlnjek podle návodu, kreslení do rámečků podle nápisů, to všechno dělá vyučování jistě zajímavým a pro děti přitažlivým, protože děti jsou na celém světě stejné - mají rády zvířátka, obrázky, hádanky; tedy žádné "učení - mučení", ale v pravém slova smyslu "škola hrou".

Ale nejen spousta ilustrací, ne-

jen domečky, figurky a jablíčka, ale i to, že je v této sympatické knížce užito různého druhu písma, tiskací i psací, i to má svůj půvab - připomíná to kdysi tolik oblíbený slabikář.

Jinými slovy "Esperanto pro děti od osmi let" je učebnice napsaná se vzácným pochopením pro ty nejmenší a navíc značně usnadní práci všem vyučujícím esperanta - každé lekce se rovná pečlivě vypracované přípravě na jednotlivé hodiny.

V závěru své stručné recenze chci vyslovit vřelé díky jak L. Prachařovi za skutečně znamenité dílo, tak Vuku Echterovi, který na této učebnici spolupracoval a věc zkontroloval. Moje díka patří i vedení základní školy v Pacově a všem, kteří poskytli autorovi potřebné zázemí k jeho tvůrčí práci.

Eli Urbanová

Poděkování čestných členů

"Vyznávám, že vše, co jsem pro esperantské hnutí u nás i v zahraničí za více než 50 let života vykonal, činil jsem tak z hlubokého přesvědčení, že sloužím velké a šlechetné myšlence, pro kterou je nutno obětovat mnohé z toho, čím obvyčejný člověk disponuje", píše ve svém dopise Ústřednímu výboru ČES Dolfa Bartošík, jenž byl na posledním zasedání ÚV ČES zvolen čestným členem Českého esperantského svazu.

Za své zvolení poděkovala také další čestná členka Svazu Eva Seemannová. V dopise předsedovi ČES J. Vítkoví napsala mj.: "Dovolte mi, abych Vám, všem členům svazu i jeho předsednictvu srdečně a upřímně poděkovala za prokázanou čest, které si velmi vážím a na níž jsem hrdá. Nemám ráda sliby, že "budu i nadále pracovat" pro esperanto, protože slova řečená i napsaná nejsou nic, ale Vy víte, že opravdu pracuji dle svých skromných možností a ráda".

* * Jubileo * *

(Al naŭdekjarigo de Božena Vlčková-Metznerová)

En via aĝ' de naŭdek jaroj
akceptu, kara sinjorino,
por fidelec' kaj multaj feroj
kovrataj de merit-patino,
nian aprezon, nian dankon.

Tra via vivo ore glimas
labor' por lingvo tuthomara,
pro ĝi ni amas kaj estimas
vin, jubileantino kara,
portanta hare aĝan blankon.

Kiam hodiaŭ rerigardas
vi tempon, kiun vi trairis,
ekŝajnas eble, ke ne fartas
l' afero, kiel vi deziris,
sed malkontent' ne kovru vangon,

Ĉar fruktojn portas la hormiloj
al bona celo dediĉitaj
de la plej bravaj tergefiloj
venontajn al sekvad' invitaj,
donontajn korojn, ne la sangon.

En via aĝ' de naŭdek jaroj
kun Esperanto vi samaĝas
kaj ni ĉi-tage sen avaroj
al ambaŭ dankas kaj omaĝas.
Plu sanu! skandas nia lango.

Jiří Kořínek

La 90-an naskiĝtagon de merit-
hava laborantino sur la kampo de
la Internacia Lingvo, s-ino Bože-
na Vlčková - Metznerová omagis es-
perantistoj el Ústí nad Labem kaj
Teplice kun pluraj gastoj ankaŭ el
aliaj lokoj per kultura programo

en la muziksalongo de la Domo de
Kulturo en Ústí n.L. La jubilean-
tino, kiun oni alveturigis aŭte
el la Instituto de sociala seku-
rigo (Domo de maljunuloj) en Dubí
apud Teplice, oni honoris per kon-
certo, en kiu per artisme altnive-
la prezento kantis solistoj de la
Operejo de la Ŝtata teatro de Zd.
Nejedlý en Ústí n. L., A.Farná, J.
Scholzeová kaj M. Smyčka famajn a-
riojn kaj klasikajn kantojn en
tradukoj de J. Kořínek kaj T. Pum-
pr ĉe pianakompano de d-ro V. No-
vobilský. Du poemojn recitis D.No-
vobilská.

En la sekvinta kunestado en la
klubejo de la Sindikata Domo de
Kulturo de Laboruloj en sia alpa-
rolo aprezis d-ro V. Novobilský ĈSc,
la preskaŭ sesdekjaran meritan
agadon de s-ano B. Vlčková-Metz-
nerová en la Esperanto-movado sur
kampoj organiza kaj literatura kaj
kiel gvidintino de multaj kursoj
en Kladno, en Prago kaj Teplice.
Por la Esperanto-rondeto de la
Sindikata klubo de la n.e. Bonex
en Teplice transdonis al la sole-
nato honoran diplomon kaj flori-
donacojn d-ro Z. Rusín. J. Kořínek
recitis versojn dediĉitajn por tiu
ĉi okazo al la merithava kaj mo-
desta virino. Poste oni legis mon-
trojn el la tradukista kunlaboro
de la jubileantino en la Ĉeĥoslo-
vaka Antologio kaj el la traduko
el la verkaro de M. Majerová.

En la intima intermuziĝo pa-
santa en la internacia lingvo kaj
parte ĉefe kaj buntigita per komu-
na kantado ĉe gitaro, rememoris B.
Metznerová en freŝa Esperanto sian
multjaran agadon kaj kelkajn E-
kongresojn (Prago, Helsinko, Ro-
mo), kiujn ŝi partoprenis. Glasoj
da vino leviĝis toste je la honoro
de la anime kaj korpe freŝa naŭ-
dekjarulino.

2. 6. 1977

J. Kořínek

Al la senlace agema samideanino
ĈEA tre kore gratulas.

"Ne riproĉu spegulon,
se ĝi montras nigrulon."

Samideanoj en la ĉefurbo aranĝis renkontiĝon. Estis agrable revidi malnovajn amikojn kaj konatiĝi kun novaj. Oni premis manĝjn, interkisiĝis eĉ - kaj post aŭdo de nova nomo oni ĝentile diris: "Ĝojas min!" Ĉar venis multaj novaj Esperantistoj - eĉ el la najbara lando, oni aŭdis tre ofte tiujn salutvortojn. "Ĝojas min!" - kaj multaj novaj kaj ankaŭ la malnovaj adeptoj de la internacia lingvo sentis feliĉon pro tio, kiel bone ili scias traduko el sia nacia lingvo, laŭvorte. Ja vere tro laŭvorte!

Bedaŭrinde, tro radikigiĝis laŭvorta tradukado el nacia lingvo - iam oni devas eĉ admiri la rapidan kapablon traduki dum flua interparolo la vortojn de penso figuranta en la kapo en formo nacilingva - oni ne lernis pensi en Esperanto...

Sperto plurfoje jam montris, ke ankaŭ malnovaj samideanoj rifuzis la atentigon pri la malĝusteco de "Ĝojas min!" La nekredemuloj bonvolu konvinki sin per enrigardo en la plenajn vortarojn: ili trovos, ke la verbo "ĝoji" estas **n e t r a n s i t i v a**.

Kiam vi interkonatiĝos kun nova amiko, salutu lin simple: "M i ĝ o j a s i !"

Dum la renkontiĝo supre menciita okazis i.a. laborkunveno. Aperis tasko, kies plenumo ŝajnis al la membroj tro riska. Fine la gvidanto de la kunveno proklamis: "Bone, mi prenas la aferon je sin". Ree laŭvorta traduko el la ĉeĥa. Ĉu vi vidas la du erarojn? Kiel belege sonas la proklamo en ĝusta Esperanto: Bone, mi prenas la aferon sur min... au: sur miajn ŝultrojn!

La kunvenon ĉeestis kelkaj samideaninoj el la provinco. Malpacience ili atendis la finon de la kunveno, volante vidi la magazenojn de la ĉefurbo kaj eventuale fari bonan aĉeton. Sed estis dimanĉo. Malgaje ili revenis baldaŭ de la promeno, dirante al ĝi: "Ili ne havas malfermite". Vi bone komprenos la frazon, se vi laŭvorte tradukos ĝin en la ĉeĥan lingvon. En bona Esperanto la samideaninoj ŝuldis diri: Ho ve, la magazenoj estas hodiaŭ fermitaj.

Jen tri konsiloj, kara leganto. Certe vi atentos pli ĝustajn esprim-manierojn okaze de nia venonta renkontiĝo.

/ver/

✧ Kvin tagoj en Hungario ✧

Kvin tagoj, kiujn ĉeĥoslovakaj Esperantistoj pasigis en Hungara Respubliko (en provinco "Vas", departemento kaj urbo Szombathely en okcidenta Hungario) prave apartenas al iliaj plej belaj turistaj travivaĵoj. Plena diferenco de ambaŭ niaj lingvoj tute ne estis baro - kaj Esperanto sendiskute superregis ĉiujn ĝisnunajn spertojn en naciaj lingvoj. La studentoj de Pedagogia Altlernejo en Szombathely estis bonegaj akompanantoj por 140 Esperantistoj el Hungario, Pollando, FRG, Aŭstrio kaj ĈSSR, kiuj de la 24-a ĝis la 28-a de junio 1977 partoprenis Turistajn Tagojn de la Esperantistoj de Okcidenta Hungario.

La elekto de vizitotaj lokoj estis riĉa: la urbo Szombathely fonda fare de la romia imperiestro Claudius/Klaudio/kun amaso da romiaj elfosaĵoj; Kőszeg - kun belega katedralo kaj la muzeo de la nacia heroo Nikolao Jurišič; vilaĝo Jék kun romanika baziliko; Kőrmend - eksa reĝa urbo kun antikva fortikaĵo kaj bela klasikisma kastelo; vilaĝo

Bŭk kun fama term-banejo kaj finfine Celldŭmŭlk, kie ni vizitis moder-
nan kulturdomon kun publika biblioteko.

En Szombathely kaj Kŭrmend nin persone vizitis kaj salutis la
plej altaj partiaj kaj urbaj funkcioj: ili ĉiuj konis la signifon de
la lingvo Esperanto kaj ĝian kontribuon por plifirmigo de la interna-
cia unuaco de la laborista klaso kaj proleta internaciismo. En siaj
salutoj ili esprimis sian admiron por la Esperanto - movado kaj sian
konstantan subtenon por ĝiaj celoj.

Esperanto ebligis al ni ligi novajn amik-rilatojn kaj profundigi
la reciprokan interkonatiĝon. La hungara popolo, en sia historio multe
suferanta pro milito, vivas kviete kaj sinofere konstruas sian
socialisman estontecon. Ĝi estas gaja kaj gastama - kaj ĝian atente-
mon rilate al gastoj plialtigas gusta la Internacia lingvo kiu tute
flankanigis la lingvan baron inter ni kaj niaj hungaraj amikoj.

Ni konvinkigis pri la zorgo de la hungaraj partiaj kaj ŝtataj or-
ganoj pri la Esperanto-movado. Ni kore deziras al niaj hungaraj amikoj
pluajn sukcesojn tiurilate - kaj al ni mem la samajn atingojn en nia
lando.

/jkt/

✽ RONDETA VIVO ✽

B R N O - La 28.5. ege sukcese
prezentiĝis, kiel gasto de Brna
Kantiata Ĥoro FOERSTER, itala vira
kantiata Ĥoro Castel Flavon el
Bolzano, kantinte belegajn monta-
rajn popolkantojn antaŭ plena sa-
lonego de Besedni dŭm. La koncer-
ton peris membro de FOERSTER Ĥoro
kaj nia ano, Libor Matŭjka, kaj
en la atingitaj amikaj rilatoj in-
ter ambaŭ Ĥoroj estis interkonsen-
tita nunjara aŭtuna koncerta tu-
rneo de Foerster Ĥoro tra pluraj
italaj urboj. La italan Ĥoron akom-
panis la prezidento de EK en Bol-
zano R. Bonifacio. La koncerton
partoprenis ankaŭ urbaj esperan-
tistoj. /jv/

L A N Ŝ K R O U N - Lokaj E -
grupoj en urboj Ĉeská Třebová, Lan-
škroun, Litomyšl, Pŭlička, Svitavy
kaj Žamberk daurigas la komunajn
renkontiĝojn. Multnombraj partopre-
non havis la kunveno la 3.7. en
Lanškroun, ĉeestis ankaŭ esperan-
tisto el Francio. Post trarigardo
de bierfarejo sekvis aŭto-ekskurso
al monto Lázek, kie ĉe memorŝtono la
ĉeestintoj aŭskultis prelegon pri
la peza vivo en regiono de Lan-
škroun fine de la dua mondmilito.
La franca gasto metis poste flo-
rojn al memorŝtono de mortigitoj
far faŝistoj. Ĉe tendarfajro estis
prezentitaj novaĵoj el E - grupoj
kaj infirmoj el ĈEA. La amika kun-
veno daŭris poste per amuza pro-
gramo ĝis la malfrua vespero. Ve -

nonta renkontiĝo estos en Ĉeská
Třebová. /jp/

M N I C H O V O H R A D I Ŝ -
T Ě - Karel Blažek kun D-ro Hradil
faras nun tradukojn de ĉeĥlingvaj
tekstoj por fakaj serioj da diapo-
zitivaj el la filmaj laboratorioj
en Prago Barrandov. Akompanaj pre-
legoj-tradukaj estas enhave valo-
loraj, arte edukaj kaj lingve ri-
ĉigaj. Ili povos servi por plivi-
gigo de la rondetaj programoj.
Pretaj estas la prelegoj kun serio-
j da diapozitivaj pri Altaj Tat-
roj, Mikoláš Aleš, Promeno tra
Prago, Max Švabinský, Eŭropa pen-
troarto de la 19a jarcento. Serioj
de diapozitivaj estas malmultekos-
te haveblaj en vendejoj de la Fil-
maj laboratorioj de Barrandov kaj
la rondeto povos liveri la teke-
tojn post retajpado kaj kopiado.
Ili povos servi ankaŭ kiel donaco
al viaj eksterlandaj amikoj. Inte-
resitoj skribu al D-ro H r a d i l ,
295 Ol Mnichovo Hradištĕ 325. /vn/

O S T R A V A - VŹKG - Ankaŭ
ĉijare oni okazigos sukcesan pro-
pagandan ekspozicion PER ESPERANTO
AL INTERNACIA INTERKOMPRENIĜO. La
solena malfermo estos la 14an de
septembro je la 19a horo en la
Kulturdomo de VŹKG. La ekspozicio
daŭros ĝis la 21.9.

Z N O J M O - La 9.7.77 okazis
jam la tradicia "Amuzvespero" kun
konkursoj, recitado, kantado kaj

✧ El eksterlando ✧

NOVA HORARO DE LA ITALAJ STAT-FERVOJOJ enhavas klarigojn en Esperanto kaj pluaj kvin lingvoj. Ankaŭ en horaroj de la hungaraj fervojoj klarigoj estas denove en Esperanto kaj pluaj kvar lingvoj.

LA UNUAN INTERNACIAN LERNEJON en urbeto St. Gerard apud Namur partoprenis kun siaj instruistoj 158 infanoj el 5 landoj kaj, en la ago inter 9 ĝis 11 jaroj. Ĉiutage estis dum duonhoro instruita Esperanto kaj pluaj lernobjektoj kiel matematiko, geografio, desegno, muziko kaj sporto estis instruataj pere de la internacia lingvo. Favore raportis belga televido kaj pluraj belgaj ĵurnaloj. La lernejon organizis Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj.

S-INO E. BORMANN, NOVELEKTITA PREZIDANTINO de Germana Esperanto-Asocio, ricevis persone gratulegramon de la germana federacia kanceliero H. Schmidt.

EN ANGLA URBO SWANWICK OKAZIS en majo nunjara la 29-a kongreso de Internacia Fervojista Esperantista Federacio kun ĉ. 400 partoprenintoj el dek sep landoj. Kunsidisa diversaj komisionoj okazis fakprelegoj, teatra vespero kaj du folkloraj vesperoj. La kongreson, kiu bonege sukcesis, partoprenis fama poetino M. Boulton per du prelegoj. Venonta kongreso de IFEF okazos en la jaro 1978 en Romo.

EN UNIVERSITATO DE TEHERANO komenciĝis fine de majo jam la naŭa kurso de Esperanto. Jam pli ol 2 000 studentoj partoprenis ĝi tiujn kursojn. La dekan oni inauguros en septembro nunjara.

NIGRAMARAN ESPERANTO - TENDARON organizis oficiale, turisma buroo "Pirin" fine de aŭgusto en pitoreska restadejo "Kamĉija". La tendaro devus venontjara fariĝi postkongresa aranĝo de UEA en 1978 de la Universala Kongreso en Varna. Informojn kaj aliĝilon oni rekte petu ĉe Buroo "Pirin", bulv. A. Stambolijaki 30, Sofia, Bulgario.

POLA NACIA BANKO eldonos moneron en valoro de 100 zlotoj kun la portreto de d-ro L. Zamenhof en

jaro 1980.

UNU EL LA PLEJ GRAVAJ FILOLOGIAJ REVUOJ por lernado de fremdaj lingvoj "Le lingue del mondo" aperanta en Milano komencis publikigi kurson de Esperanto.

KAFEJO "ESPERANTO" situas en moderna kvartalo proksima al la Ĉefstacidomo en Vroclavo, Komandorska str. 147, Pollando. La menuo kun informoj en Esperanto estas dulingve presita kaj kelnerinoj post la kurso priservados la gastojn en la internacia lingvo. En la kafejo troviĝas anguleto kun esp. gazetoj.

ITALA TELEVIDA STACIO TELEROMA 56 elsendis dum la lastaj sep semajnoj ses programojn (entute 5 horojn) pri Esperanto. Pro tre favora eŭo estis decidite, ke ekde la venonta aŭtuno okazos televida kurso de la internacia lingvo.

POLA ESPERANTO-ASOCIO kune pola gazetaro organizas tutŝtatan kvizon pri Esperanto. Intereso pri ĝi estas ege granda. Ĉefpremio unusemajna senpaga restado en banloko Mielno, plus libroj, grammatikoj.

EN ZAGREBO KAJ BJELOVAR okazis en oktobro jam la deka Internacia Pupteatra Festivalo de profesiaj artistoj uzantaj en eksterlando kaj aŭtaŭ diverslingva publiko la internacian lingvon. La festivalon partoprenos 12 profesiaj ensembloj el Eŭropo, Azio kaj Afriko. Ĝis nun okazis 347 prezentadoj por pli 100 000 spektantoj en 24 urboj de Jugoslavio.

/jv/

✧ Kroniko ✧

MUDr. Vladimír Š k o d a kaj MUDr. Vladimíra D o l e ž a l o - v á geedziĝis la 15.7.1977. Plej sincerajn bondezirojn!

Geedziĝis Hana O c e l á k o - v á kaj Jaroslav M a r e k la 18. 6. 1977. Plej korajn gratulojn!

ludoj. Partoprenia 35 s-anoj. La klubo krome aranĝis informan ekspozicion el bildkartoj kaj E-ler-nolibroj en la biblioteko por junuloj. /vr/

Zprávy ze sekretariátu

Ve dnech 1.10.-2.10.bude v Mělniku jednat plénum ÚV ČES. Eventuální vaše návrhy je nutno zaslat ihned na adresu svazu. Během tohoto zasedání proběhne rovněž seminář funkcionářů svazu. Každá naše MS vyšle po 1 zástupci nepočítaje v to členy ÚV. Velké MS vyšlou po 2 funkcionářích.

Očekává se, že tento náš seminář navštíví členové sekretariátu MEM včetně jeho generálního tajemníka W. Gilberta z Francie.

Zasedání ÚV ČES bude veřejné pro všechny přítomné funkcionáře.

Obsahem jednání ÚV je zejména:

- plán činnosti a rozpočtu svazu na rok 1978

- organizační zabezpečení sjezdu svazu v roce 1979 včetně určení termínu a místa konání

- kongres UEA v roce 1978

- zpráva o dosavadní činnosti předsednictva svazu a plnění plánu činnosti svazu pro rok 1977 za první tři čtvrtletí

Náš svaz odeslal na adresu LKK 62. UK UEA v Rejkjavíku symbolický dar, plastiku prof. Hradeckého z Jablonce, s tím, aby byl předán zástupci vlády Islandu jako vyjádření úcty zemi, které již po staletí nevedla válku. Věříme, že vám budeme moci zveřejnit fotografie této plastiky v příštím čísle Starta.

! Nabídka !

Máme pro vás připraveny některé nové tituly knih:

z MLR: Turista kantaro Hungario sur la bildoj	20,-- Kčs
Budapest	55,-- Kčs
Balaton	11,-- Kčs
Domfabriko	11,-- Kčs
Kvaropo	49,-- Kčs
De paĝo al paĝo	44,-- Kčs
	29,-- Kčs

ČSSR: Krucenigmoj kaj humoro 18,-- Kčs

NSR - Holandsko:

Kolekce esperantských samolepek s různým námětem /včetně 62.UK UEA v Rejkjavíku - 5 ks10,-- Kčs

SSSR: nové odznaky s esperantským textem (5 druhů) po 7,-- Kčs

Korespondenti deziras

Grupo de 16 - 35 j. aĝaj esperantistoj el Dzialdowo, 13 200 Pollando pri div. temoj:

Janina Wozniak, str. Jagielly 46 o Mirosława Gawlińska, str. Jagielly 34 o Eva Matusiak, str. Ksiezodworeka 58 o Malgorzata Skuza, str. Boczna 6 o Eva Smolicz, str. Sklodowskiej 3/8 o Anna Rogowska, str. Nidzicka 17/7 o Fezój Ike-wogor, str. Nidzicka 17/7 o Jolanta Jaroszynska, str. Nidzicka 19/31 o Maria Tadrzak, str. Zaciez 21 o Mirosława Grodzicka, str. M.Rejsa 5 o Jadwiga Masiak, str. Zamkowa 7 o Eva Sotomska, str. Nidzicka 11/29 o Teresa Cieslinska, str. Kolewowa 16/7 B o mgr Jan Regulski, str. Grunwaldzka 4 Liceum Zawodowe o Bogdan Klosowski, str. Nidzicka 11/28 o Stefan Barandowski, str. Nidzicka 9/11 o Maria Witkowska, str. Pocztowa 9/21 o Maria Jakubowska, str. Lakowa 16/26 o Andzej Golebiowski, str. Pocztowa 9 o Anna Zajkowska, str. Lidzbarska 17 o Eva Swiecik, str. Mlynska 12/4 o Eva Sotomska, str. Nidzicka 11/29 o Jadwiga Masiak, str. Zamkowa 7 o Jan Regulski, str. Grunwaldzka 4 Liceum Zawodowe o Mirosława Gawlińska, str. Jagielly 35 o

N.Krawczyk, Kraków 30-669, ob. Koziów-wsk, ul. Okolna 26/114, Pollando o Maria Czopek 21j. Kraków - Nowy Proucim, str. Teligi 20/57, Pollando o Pječorkina Eugenia, 66 / 0075 Krasnojarsk p/k 2420, Sibirio, USSR o Posedantoj de malnovaj nroj de STARTO skribu por interŝango au vendo al ero Ramón Molera, Sta Joaquina, 13, Moyá, Barcelona, Hispanio o La nova adreso de V.Škoda, antaue en Brno: Sta -

lingrad 18/9 591 01 Žďár n. Sázavou, ČSSR

Éva Oszlánczi, 17.j. flagistino H-1116 Budapest XI, Kondorosi út.14-16.IV.Lépcsház V.em.24 o G.Cervenák, studentino H-1116 Budapest XI, Kondorosi út.14-16, V.Lépcső VII. em.29 o Teknika amika Rondo NR 420 de UFU ce Hazafias Népfrent H-1119 Budapest XI. Bikszádi út. 43.

NOVAĴO - NOVAĴO - NOVAĴO - NOVAĴO - NO
Nia asocio sukcesis eldoni novaĵn propagandilojn, kiuj estas samtempe uzeblaj por ĉiu-taga bezono. Acetu silonaĵn sakojn kun kolorpresitaj vortoj ESPERANTO LINGVO INTERNACIA. Prezo de unu sako estas 15,-kronoj

RADIO ROMA dissendas ĉiudimanĉe de la 21-a horo ĝis 22,20 horo sur jenaj ondlongoj:
metroj 25,42 30,90 41,24
kilohercoj 11800 9710 7275

Skribu sur adreso: RADIO ROMA - ESPERANTO, C.P.320 I-00100 ROMA kaj petu senpagajn ilustritajn propektojn, broĵurojn de programo, revuojn kaj italaĵn flugetojn. Iliaĵ publikajoj ne estas en Esperanto, sed en angla, franca, hispana kaj itala lingvo. Bonvolu diru, kiujn lingvojn vi komprenas. Viaĵ leteroj faros utilan laboron. Ili aparte estas dankemaj se oni skribas sur aerogramoj au sur poŝtkartoj (kun poŝtmarko jam presita). Laŭble, oni eĉvitu filatelajn afrankojn. Vi aldonu ĉiam klare skribitan adreson.

VENIS JAM TEMPO KE FARMACIISTOJ ORGANIZIĜU kaj internacie kunlaboru, profitante de internacia lingvo Esperanto. Kiu opinias same, bonvolu sendi sian adreson al s-ano Rajmund Zarzycki, mag. pri farmacio, str. Bieruta 2, 76004 Sianów, Pollando. Post la necesa tempo, vi ricevos adresliston kaj pluaĵn proponojn.

HLEDÁME ADMINISTRATIVNÍ SÍLU

do sekretariátu Českého esperantského svazu.

Znalost psaní strojem nutná * * * * * Nástup dle dohody
* * * * * Možnost zkráceného pracovního úvazku *

MÁTE ZÁJEM

o dobrý výdělek mimo vaše zaměstnání?

PŘIJMEME

několik pracovníků pro zajišťování placených inzertů do našeho svazového časopisu STARTO. Výhodná podílová mzda, zajímavá práce. Jen pro podnikavé průbojné osoby se smyslem pro propagační práci a perfektním společenským vystupováním.

Bývalý člen ČES Jan Vlasák z Prahy při trestním líčení proti jeho osobě, které bylo zavedeno na základě jeho vykonstruovaných obvinění proti ČES, předal soudu písemné prohlášení tohoto znění:

"Prohlašuji, že odvolávám veškeré urážlivé výroky namířené proti Klubu esperantistů v Praze, Českému esperantskému svazu a jejich funkcionářům".
Jan Vlasák v.r.

K tomu připomínáme, že J. Vlasák byl v podstatě jenom naivním vykonavatelem nápadů určité skupiny lidí, převážně z Prahy, kteří se nechtějí smířit s konsolidačním procesem v našem svazu. Protože nemají dosti odvahy ani cti, aby se podepsali pod svoje výroky, posílají různým funkcionářům svazu i KĚP anonymní dopisy, v nichž vyhrožují, sprostě nadávají, pomlouvají a vysmívají se práci druhých. ČES velmi pozorně sleduje vývoj v tomto směru a ubezpečuje všechny poctivé esperantisty, že nekompromisně zakročí, bude-li k tomu donucen, tak jako tomu bylo v případě J. Vlasáka.



←
D-ro Jos. Hradil
prelegante en
Krakovo dum la
Medicinista kon-
ferenco/vidu la
paĝon numero 5.

* Salutletero el USSR *

la 31^{an} de julio 1977

Estimata samidano Jdeněk Krimsný!

Mi ekore solutas ŝehojn amikojn kaj sendas
bondezinjn el Rĉezekne, kie ni ĉiuj partopre-
nas la tradician 18-an Baltlandan E-tendaron.
Kiel ŝinjare ankau nun en Esperantujo ni
renkontigis per ialcizangi la sperton en
nia komunna laboro ĝui E-entuzon.

Entuziasme ni partoprenas la E-aran-
ĝojn dedititajn al la 90-jarigo de
Esperanto.

Tutkore viaj -

...sekvas 30 subskriboj de famaj Esperantistoj el Sovetunio - de la urbo
Uĝhorodo ĝis la duoninsulo Kamĉatko. La 18-an Baltlandan Esperanto-Tenda-
ron partoprenis pli ol 220 personoj el tuta USSR. Venonta jam 19a BET
okazos en Estonio.



STAVIVA

*národní podnik; krajský závod
Brno, tř. Obránců míru 4
dodává stavebniny podnikům
socialistického sektoru
i soukromým spotřebitelům.*

STAVIVA

*nacia entreprenoj; regiona negocejo
Brno, tř. Obránců míru 4
liveras konstrumaterialojn
al la entreprenoj de socialisma sektoro
kaj ankaŭ al privataj konsumantoj.*

STAVIVA



výrazně zvyšuje výnosy jahodníkových kultur

3 DENSTERKOJ

POR FRAGOJ

na jahody
fragarin

POR KUKUMOJ

na okurky a rajčata
cucumin

speciální hnojivo pro zajištění úrody okurek,
melounů, rajčat a papriky

KAJ TOMATOJ



plnohodnotné hnojivo pro efektivní pěstování
 cibule, česneku, póru a pažitky

POR BONA RIKO

POR CEPO

na cibuli a česnek
allin

KAJ AJLO

LACHEMA n. p. BRNO
závod 6 Neratovice

VYRÁBÍ
FABRIKAS

